# ATEISMO

## BULTENO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO



**Salman Rushdie, celo de teokratia atenco**

*(David Levenson/Getty Images)*

**Novembro 2022**

N-ro 35 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Proksimiĝante al la fino de la jaro 2022, ni vidas, ke du landoj elstaras en la monda atento: Ukrainio (ankoraŭ) kaj Irano (ekde septembro). Mi traktis la ukrainan militon en la antaŭa numero – ĉi tie en la Vorto kaj ankaŭ en artikolo. Dum la terura milito daŭras, en Irano en la lastaj monatoj okazas granda kontraŭteokratia ribelo, kio estas certe gravega afero el nia ateista vidpunkto. Ke tiu ribelo erupciis ne devus tre surprizi legantojn, kiuj legis antaŭ unu jaro en nia revuo pri la forta sekulariĝado de la irana popolo. Bedaŭrinde, ankaŭ nesurprize, kiel priskribite en artikolo ĉi-numere, la irana registaro reagas brutale, amasmortige.

Sed tiu abomeninda reĝimo ne nur havas efikon ene de Irano: ĝi mortigas kaj atencas ankaŭ eksterlande, kiel tre bone scias la homo sur la kovrilo, la fama aŭtoro Salman Rushdie. Pro morto-fatvo kontraŭ li deklarita de la irana reĝimo antaŭ 33 jaroj, li estis sovaĝe atakita kaj severe vundita ĉi-auguste en Usono. La atakinto provis plenumi la iranan fatvon, kiu neniam estis revokita. Pli detale pri la atenco kaj la cirkonstancoj, kiuj kondukis al ĝi, vi povas legi en tiu ĉi numero. Tamen la irana reĝimo ankaŭ estas ligita kun la ukraina milito: ĝis nun ĝi provizas Rusion per pli ol 400 senpilotaj aer-atakiloj (“drones” angle), kiuj estas jam plurfoje uzitaj en grandskalaj atakoj kontraŭ Ukrainio kaj mortigis multajn ukrainajn civilulojn kaj detruis gravan infrastrukturon.

Pro la atako kontraŭ Rushdie, la redakcio de *Ateismo* decidis inviti la legantojn respondi al la demando “Ĝis kiu grado estas akcepteble ofendi religiajn sentojn?” Ni ricevis bonan kvanton da reagoj, ĉiuj interesaj, kaj publikigas ĉi-numere la ok kontribuojn, kiuj venis al ni, inkluzive de unu de kristana pastro, kies saĝaj vortoj tre plaĉis al mi. Mi kaptu tiun ĉi okazon por dividi kelkajn miajn pensojn tiutemajn. Kompreneble, mi kontraŭstaras leĝojn, kiuj malpermesas t.n. blasfemadon kaj ofendadon de religiaj sentoj. Ke tiaj leĝoj ankoraŭ ekzistas kaj aplikiĝas en diversaj demokratiaj ŝtatoj estas nekredebla afero, kvankam tio ne kompareblas kun la persekutado, kiun ni vidas en ŝtatoj kiel Irano kaj Sauda Arabio. Laŭ mi, oni estu libera kritiki kaj sprite moki religiojn kaj ties instituciojn kaj figurojn, tamen oni agu saĝe, atenteme, respekteme se eblas.

Fine, mi ŝatus pardonpeti pro la sekva malfruiĝo de la revuo ĉi-jare. Mi laboras plentempe, faras kursojn, havas diversajn aliaj devojn kaj okupojn. En novembro mi okupiĝis en mia libera tempo pri longa artikolo pri Barato, kiun mi promesis verki jam pli frue en la jaro por pola humanisma reta revuo – kaj tiu verkado daŭris multe pli longe ol mi supozis. Kaj por tiu ĉi numero, mi verkis sufiĉe komplikajn artikolojn, kiuj postulis pli da tempo ol atendite. Dankon por via komprenemo! Mi ankaŭ ŝatus danki Anna Lowenstein pro ŝiaj pluraj kontribuoj al tiu ĉi numero krom ŝia kutima lingvo-kontrolado de ĉiuj tekstoj!

# Atenco kontraŭ mondfama ateista aŭtoro

*Nyegosh Dube (Pollando)*

Dum jardeko, la hind-brita verkisto, Salman Rushdie, ateisto el islamana familio, kaŝis sin en Londono sub 24-hora polica protektado. Baldaŭ post sia eldoniĝo en 1988, lia romano *La Satanaj Versoj* kaŭzis furiozan reagon en la islama mondo, kulminante per la publikigo de "fatvo" (islama dekreto) kontraŭ li fare de la Ajatolo Ĥomejni, la "supera gvidanto" de Irano. La fatvo alvokis la mortigon de Rushdie (kaj baldaŭ Irano ofertis 6 milionojn da dolaroj por la mortigo, do klare religia motivigo ne sufiĉis!) kaj de ĉiuj ligitaj kun ĝia publikigo. Imagu: la plej altranga figuro de unu lando ordonas la mortigadon, senprocesan, de civitanoj de aliaj landoj pro libro! En la lastaj 20 jaroj, Rushdie sentis sin plejparte ekster danĝero kaj vivis, vojaĝis, faris publikajn aperojn pli-malpli normale. Tamen, kvankam en 1998 la irana reĝimo asertis, ke ĝi ne plu instigas al plenumo de la fatvo, ĝi ĉiam restis valida, kiel rememorigis la nuna ajatolo Ĥamenei. Finfine, la 12an de aŭgusto ĉi-jare, 33 jarojn post la publikigo de la fatvo, juna liban-devena usona islamano agis plenumi ĝin.


Rushdie malsaĝe ĉesis esti singardema, kaj la organizaĵo, kiu okazigis la publikan eventon en Novjorka ŝtato, kie li estis parolonta tiun aŭgustan tagon, malsaĝe ne aranĝis sekurecon (kaj verŝajne li ne petis ĝin). Iu ajn povis facile aliri la podion, kie li eksidis por intervjuo-diskuto antaŭ la tieestanta aŭskultantaro. Ĝuste tio okazis: viro kun tranĉilo rapide suriris la estradon kaj ponardis multfoje la tute senprotektan 75-jaran aŭtoron. Tre bonŝance Rushdie travivis la atakon, kvankam suferinte severajn vundojn. En hospitalo li estis ligita al spiraparato dum unu tago. Tiutempe lia agento diris, ke verŝajne li perdos tiun okulon kaj lia filo parolis pri "viv-ŝangaj vundoj". Ekde aŭgusto aperis neniaj ĝisdatigoj pri lia stato. Bedaŭrinde, dum mia verkado de tiu ĉi artikolo, la agento informis, ke li ja perdis vidon en tiu okulo kaj la uzon de mano, kaj krome ke li havas tri seriozajn vundojn en la kolo kaj 15 vundojn en sia torso.

La atako estis tuj kondamnita de la usona prezidanto kaj multaj aliaj ŝtat-gvidantoj kaj ankaŭ konataj figuroj el la literatura mondo kiel J.K. Rowling (fama pro Harry Potter) kaj Stephen King. Tamen, ĉagrene, Narendra Modi, la ĉefministro de Barato, naskiĝlando de Rushdie, prisilentis la atakon. Nur post du semajnoj la porparolisto de la barata Ministrejo de Eksterlandaj Aferoj faris kondamnan eldiron. Nekredeble, en 1988, kelkajn monatojn antaŭ la irana fatvo, Barato fariĝis la unua lando, kiu malpermesis *La Satanajn Versojn!* Pro premo de islamaj parlamentanoj kaj pro timo de atakoj kaj tumultoj fare de islamanoj. La malpermeso restas ĝis hodiaŭ eĉ sub registaro, kiu agreseme subtenas hinduismon kaj kondukas islamofobian politikon – verŝajne, ĉar

Rushdie estas sekularisto kaj forte kritikis Modi kaj lian partion. En Irano, nesurprize, pluraj ŝtataj amaskomunikiloj laŭdis la atencon, kvankam la registaro neis respondecon.

Mi ne provos resumi la romanon ĉi tie; oni povas trovi resumojn facile en la interreto. Sufiĉas diri, ke la strukturo kaj intrigo de *La Satanaj Versoj* estas komplikaj, kaj kiel pluraj aliaj romanoj de Rushdie, ĝi uzas la literaturan rimedon "magia realismo". Mi mem legis la libron en 1989, pruntepreninte ekzempleron de biblioteko en la usona urbo, kie mi tiam loĝis. (Ekde tiam, mi legis tri aliajn romanojn de Rushdie – mi fakte preferas ĉi tiujn, speciale *La Noktomezaj Infanoj*.) Estis longaj vicoj da legontoj en Usono, kiuj rezervis ekzemplerojn ĉe bibliotekoj kaj librovendejoj. Se centmiloj da koleregaj islamanoj, kiuj ne legis la libron kaj plejparte eĉ ne havis aliron al ĝi en siaj lingvoj, ne estus freneze protestintaj kaj tumultintaj, se la Ajatolo ne estus eldoninta morto-fatvon kontraŭ Rushdie, se multaj landoj ne estus malpermesintaj la libron, ĝi tute ne estus tiom fama, tiom petata, tiom legata tutmonde!

Libro vaste nelegata de islamanoj provokis vastajn protestojn de ili kontraŭ la libro kaj ĝia aŭtoro. Sed verdire, ne gravas ĉu ili legis la libron nek ĉu ĝia enhavo estis vere ofenda – tutcerte troviĝis islamanoj, kiuj legis ĝin aŭ partojn de ĝi kaj ofendiĝis. Kio gravas estas la maniero de la reago al la libro kaj kion tio diras pri islamo, la islamanaro kaj islamaj aŭtoritatuloj. Freneziĝi amase sur la stratoj pro romano, postuli ĝian malpermeson kaj la mortigon de ĝiaj aŭtoro, eldonistoj, tradukistoj kaj vendistoj (kaj ja la japana tradukisto estis mortigita, itala tradukisto kaj norvega eldonisto ponardvunditaj, librovendejoj bombitaj): tio montras nekapablon defendi sian kredon racie, nekapablon fari inteligentan kritikon, netoleremon al aliaj pensmanieroj, rifuzon trapensi la dogmojn de sia kredo, kaj malvolon konsideri, ke temas nur pri fabeleca literatura verko.




*La unua anglalingva eldono de*
La Satanaj Versoj (Biblio.com)

Jes ja la libro estas romano, nur fikcia verko. La ofendaj fragmentoj aperas ene de sonĝ-sinsekvo de unu el la du ĉefroluloj, kiuj estas jam fantaziaj kreaĵoj de “magia realismo”. Ĉefe temas pri ensonĝa rakonto, kiu paralelas la (supozeble) veran historion de Mohameto kaj islamo, tamen aldonante epizodon, kiu en fruaj jarcentoj estis akceptataj de islamaj aŭtoritatuloj kiel vera okazaĵo (nome, ke pro satano trompo, la profeto aldonis versojn, kiujn li poste nuligis), sed nuntempe estas malakceptata de ili (kvankam ili samtempe akceptas, ke anĝelo diktis la enhavon de la Korano!) Eblas aserti, ke la romano siamaniere – per sia komplika, sufiĉe satireca, rakontado – efektive kritikas islaman dogmon pri la dieco kaj perfekteco de la Korano kaj Mohameto.

Ekde la publikigo de *La Satanaj Versoj*, Rushdie kelkfoje esprimis la opinion, ke ĉiuj religiaj tekstoj kaj ĉiuj religioj devus esti pridubeblaj kaj kritikeblaj. En *La Satanaj Versoj* Rushdie ne proponas alternativan historion de la Korano kaj Mahometo, kaj ne intencas kontesti la historian kaj idean bazon de islamo. Li prezentas fabelan rakonton, en kiu unu el la protagonistoj sonĝe spertas la rakontatan fikcian historion – ĉu sonĝo en kiu la profeto estas alia ol la profeto konata al islamanoj, signifas ke Rushdie diras, ke la islama profeto estas la sama kiel lia fikcia? Ĉiuj religioj fakte baziĝas sur fabelaj rakontoj, plenaj je supernaturaĵoj. Ja estas neniu objektiva pruvo, ke la anĝelo Gabrielo vizitis Mohameton en kaverno – oni devas simple kredi tion.

Imagu se anstataŭ la frenezaj, koleraj, mortminacaj protestoj, kaj anstataŭ la morto-fatvo de Ĥomejni, islamaj aŭtoritatuloj kaj registaroj estus invitintaj Rushdie por publikaj debatoj pri islamo kaj religio. Imagu se Rushdie estus havinta la okazon klarigi sian mondvidon kaj ankaŭ la celon kaj intrigon de la romano kaj aŭskulti la demandojn, kritikojn kaj riproĉojn de islamanoj. Imagu se islamaj kleruloj en islamaj landoj, kiuj defendis la esprim-rajton de Rushdie, estus havintaj la okazon fare tion publike sen danĝero de aresto aŭ mortigo.

Sed bedaŭrinde, la realeco estas ke religiaj dogmo kaj netoleremo regas en granda parto de la islama mondo, kaj ke por milionoj da islamanoj, la Korano estas sankta, Dio-revelaciita, nekritikebla libro kaj islamo estas nepridubebla kredaro, kaj aparte islamanoj ne havas la rajton kritiki, pridubi, moki sian religion. Sekve, iu ajn sugesto, ke la profeto ne deklamis diajn vortojn kaj havis homajn malperfektecojn ne estas akceptinda al multe da islamanoj. Verŝajne Rushdie celis edukitajn, sekularajn legantojn en la Okcidento kaj aliloke, kaj ne atendis, ke la libro subite diskoniĝos tra la islama mondo, kaj ke britaj imamoj vizitantaj Iranon instigos deklaron de la fatvo. Tamen, por esti plene justa, menciindas, ke ankaŭ diversaj kristanaj kaj judaj aŭtoritatoj, kiel la Vatikano, la ĉefepiskopo de Canterbury kaj la ĉefa sefarda rabeno de Israelo, forte kritikis *La Satanajn Versojn* eĉ post la publikigo de la fatvo.

Mi finu per atentigo pri io, kio rekte rilatas al ni Esperantistoj. En *La Satanaj Versoj*, en ĉapitro, kie la intrigo disvolviĝas en Londono kaj ĝia multetna etoso, kaj ne rilatas al islamo, aperas la frazero “la Esperanto-simila vakeco de grandparto de moderna arto”. Tio certe estas insulta al nia lingvo kaj komunumo! Tamen Esperantistoj ne protestis kaj tumultis tutmonde, la prezidanto de UEA ne publikigis dekreton instigantan Esperantistojn mortigi Rushdie! Tiu frazero estas ekzemplo de la sufiĉe vaste ekzistantaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto eĉ inter edukitaj kosmopolitaj homoj kiel Rushdie, kiu plenplenigas siajn romanojn per aludoj al ĉiuspecaj aferoj, tiel ekspoziciante sian vastan scion. Umberto Eco, amiko de Esperanto, ankaŭ liberpensulo kiel Rushdie, bone konis lin. Mi ŝatus imagi, ke Eco (forpasinta en 2016) iam klarigis al Rushdie pri Esperanto kaj ĝia vivanteco kaj esprimpovo. Certe Eco estus ŝokita pri la atenco, same kiel ŝokiĝis ni Esperantistaj ateistoj.

## Kial Rushdie ne ricevis la Nobel-premion?

La Nobel-ĵurio foje uzas la prestiĝon de siaj premioj cele al protektado de gravaj minacataj figuroj, kiel Solĵenicin, aŭ pli freŝdate la Nobel-premiitoj pri paco Dmitrij Muratov, rusa ĉefredaktoro de la sendependa enketema gazeto *Novaja Gazeta*, kaj Maria Ressa, filipina ĵurnalistino. Sed kial al Salman Rushdie neniam estis atribuita Nobel-premio?

Ampleksa estas lia verkaro. Inter *Midnight's Children* (La Noktomezaj Infanoj) antaŭ kvardek jaroj kaj *Quichotte* (Kiĥoto) en 2019, Rushdie aŭtoris virtuozan verkaron, nutritan de ĉiuj grandaj literaturoj el la orienta kaj okcidenta mondoj. Ĉu li ne estas je la nivelo de Thomas Mann, Luigi Pirandello, Gabriel Garcia Márquez? Ĉu liaj verkaro kaj vivo la mondon lumigas malpli ol la verkaro kaj vivo de Jean-Marie Le Clézio?

Evidente, ne la verkaron de Salman Rushdie taksis la Nobel-ĵurio, sed la danĝeron omaĝi al li. La islama terorismo ĉiujn timigas. Neniu volas inviti problemojn de tiaj personoj, kiuj kapablas plej fie reagi. Tial, laŭ la gamo de hororoj, estas preferinde suferi persekuton de totalisma reĝimo ol esti trafita de fatvo. Persekutado laŭ ordono de Putin aŭ de la ĉina komunisma partio merite igas vin heroo. Fatvo igas vin pario. Je certa danĝernivelo la savontoj rezignos pri vi. Tion scias la islamistoj. Estas ilia venko. Kaj estas malvenko por ni kaj por la Nobel-ĵurio, simbolo de nia laŭcirkonstanca moraleco. (…)

*Ero el artikolo titolita “Vi estas Salman Rushdie” de Philippe Val, kiu aperis en la franca semajna gazeto Franc-Tireur (n-ro 40 – 17.08.22). Tradukita Esperanten de **Pascal Vilain (Francio).***

# ATEISMA VIVO

## Ĝis kiu grado estas akcepteble ofendi religiajn sentojn?




### Katja Lödör (Belgio)

Ofendi neniam devus esti la celo de iu ajn diskuto. Per ofendo oni atingas nenion. La celo de diskuto aŭ diskonigo de opinio estas atentigi homojn pri agoj aŭ pensoj, kiuj laŭ la propra opinio ne kongruas kun la realo aŭ vero.

Se iu ne konsentas pri iuj religiaj agoj aŭ pensmanieroj, tio devas esti esprimebla. Certe en demokratiaj landoj tio eblas. Tamen en lando, kie religio estas enplektita kun regado, tio tre verŝajne ne eblas.

Eĉ se oni bone priatentas sian esprimmanieron, oni ĉiam riskas ofendi homojn, kiuj ne lernis libere pensi kaj prijuĝi kun malfermita menso. Homoj, kiuj ekde junaĝo ne havis la eblecon mem pripensi kaj juĝi pri la vivo ĉirkaŭ si, sed simple devis akcepti ĉion, kion aŭtoritatoj (familio, religio, ŝtato) diktas, iĝas indiferentaj aŭ fanatikaj se ili volas aparteni al la grupo. Do ĉefe el tiu lasta grupo, homoj ofendiĝas pro kritikoj kontraŭ religio. La historio montris ĝis kia grado de malbono tia fanatikeco kondukas.

Do eĉ se oni ne volas ofendi kaj klopodas kiel eble plej milde publikigi sian opinion pri religio, oni ĉiam riskas malagrablaĵojn fare de fanatikuloj. Tamen restas la devo de liberpensuloj disvastigi opiniojn tiurilate por ebligi evoluon en la pensmaniero de tiuj, kiuj havis la malfeliĉon naskiĝi en dogma kaj subprema medio.

## Jiri Proskovec (Germanio)

Mia respondo al ĉi tiu demando estas jes kaj ne. Dependas de la cirkonstancoj. Mia principo estas morala imperativo de Kant, kiu diras: "Agu tiel, kiel vi volas, ke ankaŭ aliaj agu".

Do, se ni tion aplikos al la menciita demando, rezultas el tio, ke ne estas akcepteble primoki aŭ ofendi homojn pro ilia religio. Ĉar ankaŭ al mi ne plaĉus se, ekzemple, iu religiulo nomus min stultulo pro mia ateismo. Alie aspektas la demando, se temas pri ĝenerala kritiko de religioj kaj la religieco. Povas esti, ke kelkaj religiuloj sentas sin ofenditaj pro nura kritiko de religio. Ĉu ni pro tio rezignu pri kritiko de religioj? Certe ne! Religiokritiko ne estas atako kontraŭ unuopaj homoj. Kompreneble ankaŭ religiuloj rajtas kritiki ateismon. Tio estas nenia ofendo.

Sed kion ni diru pri karikaturo de religioj? Ĉu oni rajtas karikature ridindigi religian kredon, religiajn altrangulojn aŭ eĉ profetojn? Ankaŭ ĉi tie mia respondo estas jes. Kio estas la funkcio de karikaturo? Ĝi esprimas kritikon en troigita kaj amuza maniero. Kritikon oni en libera socio nepre povu kaj devu esprimi, eĉ se kelkaj povas senti sin per tiaspeca kritiko ofenditaj.

Ni ateistoj ne devas permesi, ke religiokredantoj en liberaj sekularaj socioj decidu, kio estas rilate al religio permesebla. Hodiaŭ ili malpermesus karikaturojn kaj morgaŭ kia ajn kritiko de religio "ofendus" iliajn religiajn sentojn. Kio estas permesebla, tion difinas la leĝoj. Ankaŭ karikaturo ne rajtas ĉion. Karikaturo, kies sola celo estas nur ofendi, ne estas akceptebla. Ĝi eĉ povus esti kontraŭleĝa; ekzemple karikaturo, en kiu oni uzas Koranon kiel necesejan paperon. Aliflanke karikaturo de Mohameto kun bombo en sia turbano estas akceptebla, ĉar ĝi atentigas pri la vera problemo de islama terorismo.

## Martine Rivière (Francio)

Laŭ mi, ne eblas difini la "akcepteblan gradon" rilate la ofendon de religiaj sentoj, ĉar tio estas subjektiva sento, ne mezurebla. De kie venas tiu ofendo fakte? De la religioj mem: ili starigis dogmojn, kiuj difinas la konduton de la kredantoj. Tiuj devas obei ilin sub minaco de punoj. En Francujo, la leĝo decidis "la apartigon de la ŝtato disde la eklezioj", do la dogmoj de la religioj koncernas nur la kredantojn. Konsekvence, nekredantoj ne estas submetataj al tiuj dogmoj kaj havas plenan rajton je blasfemo.

Krome, kial religio estu aparta temo, kiu postulas apartan traktadon? Ĉiuj povas senti sin ofenditaj de malsama vidpunkto krude esprimita, pri iu ajn temo. Ĉu tio meritas juĝan kondamnon? Evidente ne. Religioj estas kredoj, filozofioj de vivo... kaj, kiel ĉiuj filozofioj, povas, eĉ devas, esti traktataj, same kiel iuj ajn abstraktaj ideoj. Diskutu, disputu, eĉ primoku sed ne batalu!

Oni nepre respektu homojn, sed oni neniam sentu sin devigata obei iliajn kredojn.

## Wolfram Rohloff (Germanio)

Ĝis kiu grado estas akcepteble ofendi religiajn sentojn? Per tiu demando la redakcio de *Ateismo* invitis verki artikolojn. Mi konfesas, ke mi ja estas abonanto, sed kredanta kaj kristana kaj – ho ve ;-) - pastro. Permesu tamen al mi skizi, karaj ateismemaj legantoj, miajn pensojn, ĉu kaj ĝis kiu grado akcepteblas ofendoj.

Komence de la dekkvara jarcento post Kristo kolektiĝis latinlingvaj instruaj legendoj kaj fabeloj je la nomo *Gesta Romanorum* (La agoj de la Romianoj). Unu el tiuj anekdotoj estas rakonto el la vivo de la imperiestro Domiciano: Vendisto vizitas la imperiestron kaj vendas al li tri saĝaĵojn, kiuj poste savos la imperiestran vivon. La unua saĝaĵo estas: "Ĉion, kion vi faru, saĝe faru, kaj rigardu la finon kaj celon." Jen tio, kion mi ĉi tie rekomendas!

Estas grava diferenco inter "ofendi" kaj "kritiki". Se instruisto dirus al lernanto, kiu erare respondis, "Vi estas stulta idioto", tio estus ofendo. Ofendo esence estas atako kontraŭ persono aŭ animo. Ofendo vundas – ĉu konscie ĉu ne – la ofenditan personon aŭ celas vundi. Se instruisto dirus: "Vi eraris kaj mi klarigos al vi, kial. Bonvolu aŭskulti...", la lernanto ne estus ofendata kaj havus eblecon akcepti sen vundiĝo tiun kritikon kaj lerni per sia eraro. Kontraste al tio, la kutima, "natura" reago post ofendo estas memdefendo kaj emo "repagi", venĝi la hontigon.

Se vi do en iu ajn situacio decidas ofendi, *respice finem*, do rigardu la finon kaj celon! Ĉu vi intence atakos kaj vundos? Ĉu vi volas kaŭzi malŝaton? Ĉu vi planas ridindigi alian? Ĉu vi eble per viaj lertaj vortoj volas publike eĉ detrui renomon? Ofendu, sed ne forgesu, kion kaŭzos ofendo via: malpacon.

Mi rekomendas alian vojon: Kritiku! Tio povas esti humurplena afero. Eblas kritiki sprite kiel jam skribis Horacio: "Ridante diri veron, kio ĝin malpermesas?" Mi certe ne! Ĉu vi volas montri, ke ideo, religio, penso, libro, teorio aŭ ne estas konvinka aŭ estas por vi neakceptebla? Tiukaze kritiku sen ofendi! Ne vundu nek detruu ies renomon! Certe restas risko, ke homoj, speciale homoj, kiuj mem dubas pri sia propra – ĉu religia ĉu nereligia – kredo, volonte aŭdos eĉ en la plej sobra kritiko akran ofendon. Tamen vera kritiko necesas kaj eĉ helpas al la kritikato.

Fina penso: Ni okcidentuloj rememorante ekzemple la ŝokajn atencojn en Parizo en 2015 tro facile emas juĝi, ke tiaj krimoj estas frukto ĉu de unu specifa religio, ĉu de religioj ĝenerale. Samtempe ni evitas rekoni, kiom sange furiozas dum jarcentoj niaj "raciismaj" okcidentaj, ofte kontraŭreligiaj ideoj. Do por buĉi sian fraton, religio tute ne necesas. Sufiĉas jam nia tipe homa orgojlo.

## Hugo Mora (Kostariko)

Oni ne nur ne devus ofendi religiajn sentojn, sed ankaŭ nereligiajn! Dum longaj jarcentoj preskaŭ ĉiuj kredis je iu dio. Tio alkutimigis preskaŭ ĉiujn pensi, ke neniu en la sama grupo kredas alimaniere. Sed nekredantoj ekzistis ĉiam kaj devis elteni netoleremon kaj persekutojn. Ĝis la modernaj tempoj en Eŭropo, post longaj kaj sangavidaj religiaj militoj, venis la jaroj kiam la ŝtatoj rekonis la rajtojn, al ĉiuj homoj, pri religia kaj kulta libereco.

Tiel naskiĝis tiuj du gravaj rajtoj pri religio. Oni komencis libere paroli kaj diskuti (ne ĉiam pace!) pri religioj. Tamen multaj forgesis, ke tiuj du rajtoj estas nur parto de pli vasta rajto: tiu pri penso aŭ konscienco. Ĉar se oni ne rekonas kaj respektas tion, oni akceptas la falsan kaj danĝeran ideon, ke ĉiuj, absolute ĉiuj homoj kredas je iu dio!

Kiam mi prezentas min kiel ateiston en kristana kulturo, mi klarigas, ke mi ne nur ne kredas je tiu dio, Dio, sed pri iu ajn dio aŭ diino! Mi do estas ateisto pri ĉiuj gedioj. Strange, ĉiuj aliaj dioj havas propran nomon (Javeo, Zeŭso, Alaho, Odino, Afrodito, ktp); tamen tiu ĉi orgojla, egoisma judkristana dio alpropigis al si la nomon de la tuta kategorio!

Konklude: Tiuj, kiuj hodiaŭ sentas sin ofenditaj kiam oni parolas aŭ agas kontraŭ iliaj religiaj sentoj, devus ĝisfunde pripensi la aferon. Ĉar dum tre longaj jarcentoj, ni (ateistoj, agnostikuloj, liberpensuloj, nekredantoj, ktp) suferis malestimon, persekuton, enkarcerigon, torturon, mortpunon, ktp. Eĉ hodiaŭ oftiĝas la situacioj, kiam ni devas nevolonte legi, aŭdi aŭ spekti publikajn religiajn mesaĝojn, kiuj certe ofendas niajn nereligiajn sentojn! Religio estas privata afero, do ĝi refariĝu tia!

Pro tio, bonvena estus la sekulara ŝtato ĉie kaj por ĉiuj!

## Horst Vogt (Germanio)

La demando stariĝis en kunteksto de la plurfoja publikigo de la t.n. karikaturoj de la profeto, kiuj instigis fundamentistajn islamanojn al kruelaj kaj ne pardoneblaj murdoj “por puni la kulpigitajn ofendintojn” de iliaj religiaj sentoj.

Mi faras distingon. Se mi diskutas kun kredanto pri religio, mi ne prisilentas, ke mi ne kredas je iu dia estaĵo. Mi emfazas, ke la sciencoj laŭ mia opinio sufiĉe konvinke priskribas la evoluon de la kosmo post la praeksplodo kaj ke Charles Darwin pruvis, ke ĉiuj vivaĵoj - ankaŭ la nunaj bestoj kaj la homoj - dum multaj jarmilionoj evoluis el unuĉelaj estaĵoj. Mi pro tio kontraŭas la opinion de homoj, kiuj kredas, ke la nunaj vivoformoj, precipe bestoj kaj homoj, nepre postulas iun kreinton, kiu ĉiujn tiujn mirindajn estaĵojn desegnis. Mi kritikas la eklezioj, kiuj predikas, ke la homoj kredu la nepruveblajn asertojn kaj dogmojn, kaj ke estas virto ne dubi. Ĉar laŭ mia opinio studintaj teologoj ne povas nei la sciencajn eltrovaĵojn, ili malgraŭ pli bona scio instruas malveraĵojn.

Sed samtempe mi klopodas trakti kredantojn kun respekto, evitante ofendi ilin aŭ eĉ ridindigi ilin pro tio, ke ili kredas, ke Jesuo verŝis vinon el akvujo, paŝis trans lagon kaj ke virgulino naskis lin. Do, por respondi al la demando: laŭ mi ne akcepteblas intence ofendi ies religiajn sentojn. Kial mi ofendu? Mi tiel certe ne igus tiun personon konvertiĝi al ateismo. Ĉu nur pro tio, ke mi utiligu mian rajton je libera esprimo de mia opinio?

Certe estas ankaŭ uloj, kiuj facile kaj volonte sentas sin ofenditaj por havi pretekston por povi agi perforte. Tiaj karakteroj nur atendas, ekzemple, denovan publikigon de karikaturoj. Mi malkonsilas refari tion. Tio nepre kaŭzus novan sangoverŝon. Ne indas akcepti nepran aŭ eventualan verŝon de sango nur pro tio, ke oni rajtas esprimi sian opinion. Estas sufiĉe da aliaj eblecoj utiligi sian rajton je libera opiniesprimo. Ja ne estas saĝe provoki dormantan mordeman hundon.

## Saioa Escobar Calzada (Hispanio)

Hispanio estas interesa lando laŭ la vidpunkto de la demando farita por ĉi tiu numero de nia revuo. Laŭ sia konstitucio, ĝi estas demokratia kaj senkonfesia,

sed samtempe la ofendo de religiaj sentoj estas ankoraŭ delikto.

La plej konservema katolikismo, pere de reakciaj organizaĵoj de advokatoj kaj juristoj, uzas akuzojn pri ofendo de religiaj sentoj por ataki progresemajn kaj liberpensantajn homojn kaj sociajn movadojn. Almenaŭ tri lastatempaj gravaj okazoj influis la publikan opinion pro la atento ricevita de la amaskomunikiloj:

- En 2004 konata televidprogramo aperigis satiran videon faritan de kantoverkisto Javier Krahe en kiu oni bakis en forno kristanan krucon.
- En 2014 feminisma asocio organizis proteston nomitan “Procesio de la nesubmetiĝema piĉo”, en kiu aktivuloj procesiis tra la stratoj de la andaluzia urbo Sevilo portantaj grandan plastan statuon reprezentantan vulvon kvazaŭ virgulinon. Sekve de tiu manifestacio tri feministoj estis akuzitaj.
- En 2017 la fama aktoro Willy Toledo, esprimis sin solidarece kun tiuj tri feministoj laŭ maniero, kiun kelkaj katolikoj konsideris blasfema.

Ĉiuj estis denuncitaj kaj la akuzitoj riskis gravajn punojn. Tamen, la denuncoj kaj juĝ-procesoj ne sukcesis. Temis esence pri averto kaj klopodo timigi ilin (kaj ne nur). Tio estis grava minaco por la arta, pensa kaj esprima libereco.

# ATEO dum la VK 2022

Kadre de la Virtuala Kongreso de UEA, ATEO havis du okazojn por prezenti sian agadon dum la Movada Foiro. Ni aranĝis du kunvenojn taŭgajn por la malsamaj horzonoj, antaŭ kaj post la ĉefa programo. Ĉeestis dudeko da homoj en ambaŭ kunvenoj.

En ambaŭ el la du kunvenoj ni komencis per rapida prezento de ATEO, pri ĝiaj celoj, kaj pri ĝia bunta kaj enhave riĉa revuo *Ateismo*. Ni ankaŭ rapide skizis ĝian historion: la fondiĝon fare de Ralph Dumain kaj Minerva Masson dum la 72a Universala Kongreso en Varsovio en 1987; poste la revigligon fare de Claude Nourmont dum la 85a UK en Telavivo, 2000. Tio kondukis al omaĝo al Claude Nourmont, iama prezidanto de ATEO, kiu mortis en februaro 2022.

Ni ankaŭ prezentis la demandojn kiujn ni proponis diskuti:

- Kio estas ateismo?

- Kiuj estas la moralaj valoroj de ateistoj?

- Kio laŭ ateistoj estas la celo de la vivo?

- Ĉu ateistoj malamas religion?

La unua kunveno: Ni komencis per diskuto pri la diversaj terminoj por la koncepto "ateisto". Renato Corsetti komentis, ke ne estas surprize, ke oni timas ateismon kaj vidas ĝin negative, ĉar ĝi instruas al homoj pensi por si mem.

Emilio Cid starigis interesan demandon. Li mem ne estas ateisto, tamen li estas maltrankvila pro la kreskanta influo de evangeliaj grupoj en Brazilo, kaj ankaŭ pro la provoj entrudigi religion en la eduksistemon. Krome li donis informojn pri la agado de brazilaj evangeliaj grupoj en Angolo.

La ĉefa protekto kontraŭ entrudiĝo de religio estas instrui al la homoj pensi por si mem, ankaŭ instrui al ili la aktualajn malkovrojn de scienco. Tial religiuloj provas interveni ankaŭ en la lerneja sistemo, ĝuste por malhelpi, ke infanoj lernu la sciencan sintenon precipe rilate al la ekesto de la vivo, de la tero, kaj de evoluado.

Por ekstremistaj religiuloj, la publika eduksistemo estas danĝera loko, kie oni instruas al infanoj pensi por si mem. Lernejoj fakte ĝenerale ne transdonas religiajn sintenojn al infanoj, sed simple instruante al ili pensi kaj ankaŭ koni la lastajn sciencajn malkovrojn, oni praktike kontraŭas la plej simplismajn religiajn sintenojn. (Kompreneble la plejmulto eĉ da religiuloj sukcesas samtempe kredi je Dio kaj akcepti la malkovrojn de la sciencistoj.

Nur malplimulto ne akceptas tion, sed bedaŭrinde tiu estas la plej laŭta kaj aktiva grupo.)

Dum la kunveno diversaj homoj volis raporti pri la rilato de religio kun la lerneja sistemo en la propraj landoj. Sed bedaŭrinde, ĝuste kiam la etoso komencis vigliĝi, necesis fermi la kunvenon.

La dua kunveno: Ĉeestis parte la samaj homoj, sed ankaŭ aliaj precipe el amerikaj landoj, por kiuj la horzono estis pli taŭga.

Bill Maxey el Usono parolis tre entuziasme pri nia revuo *Ateismo*, kies alta kvalito instigis lin  membriĝi al ATEO.

Ni denove parolis pri la signifo de la vorto "ateismo", kio ĉi-foje kondukis al detala diskuto pri la celoj de la asocio. La listo de celoj estis kreita en 1987, kiam la asocio estis fondita. Ĉu tiuj celoj ankoraŭ validas tridek kvin jarojn poste, aŭ ĉu venis la tempo por rekonsideri ilin?

Oni ĝenerale konsentis, ke oni povas esti ateisto sen apartaj celoj aŭ agadoj. Dieter Rooke sugestis (ĉu ŝerce?), ke ATEO proponu diplomon similan al tiu, kiun donas eklezioj post sukcesa trapaso de la endoktrinigo, sed Anna opiniis, ke la fakto esti ateisto ne kunportas iun ajn devon.

Konklude, la du kunvenoj estis interesaj kaj sukcesaj. Ili donis al la membroj de ATEO okazon por renkontiĝi kaj interparoli, kaj espereble ili samtempe allogis al la asocio kelkajn novajn membrojn.

# La celoj de ATEO

1. Kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
2. Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
3. Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
4. Instigi ĉe Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
5. Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem, kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.
6. Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
7. Malkateni la mensojn!

# Ĉu vi timas la vorton ateisto?

*Anna Lowenstein (Britio)*



*Anna Lowenstein parolas ĉe ATEO-kunveno dum la itala kongreso (Mireille Grosjean)*

Jen la titolo de la kunveno de ATEO dum la itala kongreso (20-27 aŭgusto), kiu okazis en Breŝo (Brescia), Italujo. Kaj jen la priskribo el la kongresa libro:

*Ateistoj, humanistoj, laikoj, sekularistoj, liberpensuloj, raciistoj, skeptikuloj, nereligiuloj, agnostikuloj, kaj ĉiaspecaj nekredantoj estas invitataj partopreni.*

La kunveno estis anoncita en la kongresa libro, kaj tio estis granda pliboniĝo rilate al la kutima situacio. Verdire neniam temis pri diskriminacio kontraŭ ateistoj – fakte mi mem kulpis pri tio, ĉar plej ofte mi ne pensis antaŭmendi la kunvenon, kun la sekvo, ke ĝi estis organizita surloke en iu ajn libera ĉambro.

Krome oni invitis min saluti la kongresanojn nome de ATEO dum la inaŭguro, kaj vokis min tuj post la katolikoj. Tio donis al mi okazon reklami la kunvenon kaj inviti ĉiujn interesatojn, inkluzive de kredantoj, kiuj eventuale scivolas pri la pensado de ateistoj. Sekve ni havis grandan kunvenon kun 26-28 homoj, kvankam mi ne certas, kiom el tiuj estis ateistoj, kaj kiom estis scivolemuloj.

La priskribo en la kongresa libro nature kondukis al diskuto pri la vorto "ateisto". Por multaj homoj la vorto havas negativan nuancon, sed tio ne estas entenata en la vorto mem, sed reflektas la socian sintenon pri ateistoj. La greka vorto signifas "sen-diulo", kaj neniu ateisto neus, ke ni estas homoj sen dio. Tio por ni estas neŭtrala termino, sed

ne por la socio ĝenerale. Tial ekestis la multaj aliaj terminoj por la sama koncepto.

Pluraj homoj ekstaris kaj prezentis sin. Kelkaj estas diversspecaj ateistoj, dum aliaj estis katolikoj, kiuj volis kompreni pli pri ateismo. Tial ni traktis diversajn temojn, kiuj ekestis dum la diskuto. Ni iom priparolis ekzemple la historion de ATEO, kiu estis fondita dum la UK en 1987 de du usonaj esperantistoj, kiuj volis reagi kontraŭ la aktiva trudado de religiaj grupoj en la usonan politikan vivon. Tio estis la kialo de la fondiĝo de ATEO tiam, kaj kompreneble tio validas ankoraŭ nun, kiel atestas la lastatempa dekreto de la usona Supera Kortumo kontraŭ abortigo.

Alia demando, kiun ni traktis, estis, ĉu ateistoj sentas sin subpremataj de religio. Pluraj homoj donis ekzemplojn laŭ la propra sperto, dum aliaj komentis, ke eblas bone rilati kun religiuloj, kiam ekzistas toleremo en ambaŭ flankoj.

Katolika ĉeestanto volis scii, kion ateistoj pensas. Tio estas tre vasta demando, kaj ateistoj povas havi tre diversajn opiniojn. Tial ni parolis ĉefe pri la demando de la ateisma moralo. Se oni ne kredas je Dio, ĉu tio signifas, ke oni volus ŝteli kaj murdi? Kompreneble ne. La bazaj moralaj ideoj estas samaj por ĉiuj, ĉu ateistoj, ĉu kredantoj. Aliflanke en la pasinteco estis la tasko de religiaj gvidantoj instrui pri moralaj aferoj, sed nun necesas trovi alian manieron por transdoni ilin, precipe per lecionoj pri etiko en la lernejo.

Mi menciis mian propran opinion, ke religio en la pasinteco estis tiel grava parto de la socio, ke necesas instrui ĝin en la lernejo – sed tio signifas instrui *pri* religio kaj religioj, ne instrui kredi ilin. Edukitaj homoj devus ankaŭ koni la bibliajn rakontojn, same kiel oni konas la grekajn mitojn – denove, tio ne signifas, ke oni nepre devas kredi ilin!

Laŭ mia impreso, ni povas taksi la kunvenon sukcesa. Krom la granda nombro de partoprenantoj, kelkaj homoj menciis al mi poste, ke ili ĝuis la okazon. Ĝi alportis al ATEO kelkajn novajn membrojn, kaj espereble donis al la ĉeestantoj pli grandan komprenon pri la signifo de ateismo.

## Vigla kunveno de ATEO en Montrealo

Dum la Universala Kongreso en Montrealo okazis la kutima kunveno de ATEO. La temo estis *Ateismo kaj religio en edukado kaj ŝtato*. Ĉar ne ĉeestis estrarano de ATEO, kiu povis gvidi la kunvenon, ni petis Brian Moon prezidi, kaj Orlandon Raola fari la enkondukon.

Ĉeestis 20-30 homoj, inkluzive de pluraj homoj ne jam konataj ekster la nord-amerika movado. (Tio estis interesa aspekto de la kongreso ĝenerale, ĉar ĉeestis multaj novuloj, kiuj neniam antaŭe vizitis Esperanto-kongreson.) Post la prezento de Orlando okazis vigla diskutado, kiu iom vagis inter diversaj temoj. Pluraj homoj poste aliĝis kiel novaj membroj de ATEO.

# Ankaŭ ateistoj rajtas ĝui Kristnaskon!

*Anna Lowenstein (Britio)*




Ekzistas amuza libro kun la titolo *The Atheist's Guide to Christmas* (La ateisma gvidlibro al Kristnasko). Ĝi enhavas kvardekon da artikoloj de konataj verkistoj, filozofoj, komikistoj, satiristoj, politikistoj, humanistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj, aktoroj kaj aliaj, inkluzive de la fama ateisto Richard Dawkins. Evidente tiel varia kolekto da verkistoj aliras la temon laŭ diversaj vidpunktoj, sed la ĉefa mesaĝo estas jena: ke ankaŭ ateistoj ĝuas Kristnaskon, kaj ke ili absolute rajtas fari tion.

Estas pluraj kialoj, kial mi mem ĝuas Kristnaskon. La ĉefa estas, ke tio estas feria periodo. Se oni laboras en edukado (aŭ spertas edukiĝon), oni ricevas liberan tempon, kiu daŭras almenaŭ du semajnojn. Ankaŭ ekster lernejoj kaj universitatoj multaj homoj spertas la semajnon inter Kristnasko kaj Novjaro kiel apartan periodon, kiam la normalaj agadoj de la vivo paŭzas.

Ĝuste ĉar tio estas feria periodo, familio tiam havas la okazon por renkontiĝi kaj ĝui specialajn festajn manĝojn, ornami arbon, interŝanĝi donacojn ktp. La televido rezervas siajn plej bonajn programojn por tiu periodo, kaj almenaŭ en Britujo aperas ankaŭ tradiciaj spektakloj kaj apartaj teatraĵoj ofte celantaj familiojn. La fakto ke tiuj manĝoj kaj spektakloj aperas nur unu fojon jare igas ilin aparte valoraj.

Kompreneble ekzistas kristanoj, kiuj nepre volas memorigi al ĉiuj, ke tio estas religia festo, sed bonŝance la plejmulto da homoj ignoras ilin. Ili plendas, ke la emfazo nuntempe emas esti konsumismo kaj distrado, forgesante ke Kristnasko mem




"PARDONU PRO TIO – MI MORTIS DUM KOSTUMFESTO."

estis bazita sur pli fruaj festivaloj. En la skandinavaj landoj estis la antaŭkristana festo Julo, kaj cetere la vorto por Kristnasko en pluraj skandinavaj lingvoj efektive estas Jul, Jól, Joulu kaj simile. En la iama roma imperio aliflanke la kristanoj adaptis la Saturnan Feston, kiu daŭris dum sep tagoj de la 17a ĝis la 23a de decembro, kaj de kie originas multaj el la kutimoj, kiuj por ni estas nun ligitaj kun Kristnasko. Dum la Saturna Festo la homoj ĝuis festajn manĝojn, ili ludis, ili interŝanĝis donacojn, kaj eĉ sklavoj spertis privilegiojn, kiujn ili ne havis dum la cetero de la jaro.

Estas facile imagi, ke ankaŭ kristanoj dum la pagana periodo volis amuziĝi dum tiu festa periodo same kiel ĉiuj aliaj, kaj tial inventis la pretekston, ke tiam okazis la naskiĝo de Jesuo. Sammaniere judaj infanoj loĝantaj en kristanaj landoj volas partopreni en la ĝenerala festado, kaj bonŝance por ili la juda Lumfesto hazarde okazas ĉirkaŭ la sama periodo. Tial en kristanaj landoj tiu relative duaranga festivalo akiris multe pli da graveco ol ĝi normale havus, ĉar ĝi donas al judaj gepatroj la eblecon doni donacojn al siaj gefiloj same kiel ĉiuj aliaj.

En mia hejmo ni ja dekoraciis abion, kiam niaj infanoj estis malgrandaj. Tio por mi ne estis religia afero, sed nur tradicia distraĵo dum tiu periodo, kvankam mi neniam prenis ĝin tiel serioze kiel kristanaj familioj emas fari. Kaj cetere la fakto porti arbon internen estas antaŭkristana kutimo: ĝuste unu el tiuj kutimoj, kiujn la kristanoj mem transprenis de la paganoj. Ni ateistoj do senhonte transprenu la festivalon de la kristanoj, kune kun ĉiuj aliaj agrablaj – tamen nereligiaj – kutimoj de tiu festa periodo!

# PRIPENSIGOJ

## Fiziko, vivo kaj kredo

*Aleksander Zdechlik (Pollando)*

Konstanta demando penetras min: kio estas vivo? Laŭ difino en Vikipedio, "Vivo" estas karakterizaĵo, kiu distingas fizikajn unuojn, kiuj havas biologiajn procezojn (kiel ĉela signalado kaj memeltenaj procezoj) disde tiuj, kiuj tion ne havas. Homan vivon karakterizas la samaj faktoroj. La korpo de ĉiu vivanta homo scipovas memelteni kaj ĉela signalado estas kunligita kun pensado – oni povus diri, ke tiu procezo estas organizita per la animo. Laŭ tiu analizo oni povas diri, ke homo havas korpon kaj animon (nomatan foje ankaŭ psiko aŭ spirito). Simile kiel homoj funkcias aliaj vivantaj unuoj, kvankam scienco ankoraŭ ne eksciis ĉu aliaj, ekzemple mikroboj, scipovas pensi. Tiaj bestoj kiel simioj, hundoj kaj katoj scipovas tion fari kaj tio estas certa fakto, eble ne pruvita de sciencistoj, sed observata de homoj, kiuj ĉiutage havas kontakton kun ili.

Ni revenu al la homa korpo kaj animo. Ĉiuj scias, ke la korpo konsistas el multaj elementaj molekuloj nomataj atomoj, sed kio estas la animo? Ĉu la animo estas ia nemateria estaĵo? Se homo trinkas materian alkoholon aŭ uzas materian drogon ĉu la animo estas konstanta aŭ ŝanĝiĝas? Psikiatroj uzas diversajn materiajn medikamentojn por ŝanĝi malbone funkciantan animon. Tio estas fakto. Sekve mi starigas la tezon, ke ankaŭ la animo estas materio. Iam diskutante kun spiritistoj, mi surprize aŭdis la opinion, ke la animo estas ia speco de energio. La konkludo estas grava ĉar ĝi gvidas min al la opinio, ke la animo estas materia. Post tio tuj naskiĝas nova demando: ĉu la animo povas vivi eterne? Fiziko donas respondon: jes, la animo kaj fakte ĉio povas vivi eterne se ĝi moviĝas je la plej granda rapideco atingebla en la universo, la rapideco de elektromagnetaj ondoj en vakuo. Ĝi egalas ĉirkaŭ 300 000 km/sek. Estas nur unu kondiĉo: la energio ne povas veni al tiel nomata "nigra truo" ĉar de tie nenio povas reveni.

Se la supre menciita tezo estas vera, tiam tuj estas klarigeblaj diversaj fenomenoj. Ekzemple, se la animo estas materia, tiam diversaj resaniĝoj ĝis nun neklarigeblaj racie fariĝas eblaj. Parton de anima energio oni povas donaci al alia homo kaj resanigi lin.

Fine mi konstatas, ke miaj ĉi-supraj pripensoj ne donas respondon al la demando ĉu ekzistas Dio kaj ĉu ekzistas ĉielo aŭ alia spaco kun Dio. Tion astronomoj ne observis. Mi persone ne akceptas la komencon de ĉio en la fortoj de Dio, sed mi simple akceptas, ke la universo estis kaj estas kaj estos, kvankam ekzistas la teorio pri la praeksplodo de la universo. Ĝi estas nur teorio ĝis nun ne pruvita ĝisfine.

# Provoka demando de ateisto

*Anna Lowenstein (Britio)*

En la historia urbo Breŝo (Brescia), kie okazis la itala kongreso de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto, estas du katedraloj, unu apud la alia en la sama placo: la "nova", kiun oni ekkonstruis dum la Renesanco, kaj la "malnova" ronda katedralo, kiun oni ekkonstruis ĉirkaŭ la jaro 1100.

Mi mem partoprenis gvidatan viziton dum la kongreso. En la malnova katedralo ni admiris orumitan kestegon, sekure lokitan malantaŭ ora krado. La gvidistino klarigis al ni, ke tiu kestego enhavas tri pecetojn de la vera kruco, aranĝitajn en la formo de malgranda Lorena kruco, alta 14 cm.

Tio estas konsiderata unu el la plej valoraj trezoroj de la urbo. La orumita kesto estis konstruita de oraĵisto en la 14a jarcento. Ĝi estas ŝlosita per tri ŝlosiloj, kaj ĉiu el la tri estas gardata de malsama homo: de la episkopo, la urbestro, kaj la prezidanto de Asocio de la Kruco. Tiel eblas malfermi ĝin nur kiam ĉiuj tri ĉeestas. Oni elprenas la krucon du fojojn jare por prezenti al la publiko, kaj ankaŭ en periodoj de serioza bezono, ekzemple sieĝo aŭ pesto.

Aŭdinte tiun klarigon mi havis demandon: ĉu oni iam faris sciencan esploron de la ligno? Mi estis konscia, ke tio povus ŝajni provoka demando, sed mi demandis ĝentile, kaj la gvidistino respondis same ĝentile. Ŝi diris, ke oni ja iam faris esploron, kiu tamen restis senkonkluda. Ŝi ankaŭ klarigis, ke en la mezepoko, kiam la pecoj de la kruco estis alportitaj el la Sankta Lando, oni kredis, ke sufiĉas meti la lignopecojn en kontakton kun alia ligno el la Vera Kruco, por ke ankaŭ tiuj lignopecoj akiru la propraĵojn de la originala kruco.

(Legante nun artikolon en la itala Vikipedio mi vidas, ke oni nuntempe supozas, ke la pecoj de la kruco estis portitaj al Breŝo dum la 13a jarcento sekve de la kvara aŭ kvina krucmilitiro. La artikolo detale diskutas la originon de la krucopecoj,



*Pecoj de la "vera kruco" krucformigitaj - ĉe katedralo en Breŝo, Italio (Wikipedia)*

sed nenie mencias la demandon, ĉu efektive la ligno datiĝas de la 1-a jarcento.)

Per sia respondo la gvidistino agnoskis, ke tiuj lignopecoj verŝajne ne apartenis al la vera kruco sur kiu Jesuo estis krucumita, sed estis kreitaj almenaŭ mil jarojn poste. Efektive mi dubas, ĉu iu ajn nuntempa homo, eĉ la tri gardantoj de la ŝlosiloj, eĉ la Papo mem, serioze kredas, ke ili devenas de la originala kruco. Homo, kiu efektive kredus tion, estus ekstreme naiva.

Samtempe mi ja rekonas, ke per sia longa historio kaj la adorado de la publiko dum la jarcentoj, tiuj tri lignopecoj iugrade akiris valoron kiel sankta objekto, eĉ se ilia sankteco en la komenco estis senbaza.

Neniu moderna, edukita homo povas sincere kredi, ke tiuj tri lignopecoj apartenis al la kruco de Jesuo, do fari la sciencan analizon estus evidenta maniero por informiĝi pri iliaj aĝo kaj origino. Kaj tamen, eĉ sugesti, ke ili estas esplorindaj, montras skeptikecon. Kiel mi menciis, mi starigis la demandon ĝentile. Sed mi estis konscia, ke eĉ demandi tion, precipe interne de la preĝejo, povus esti vidata kiel provoka ago.

La plejmulto de la vizitantoj al la preĝejo verŝajne akceptas la aserton pri la origino de la lignopecetoj senkomente, eĉ sciante, ke ĝi nepre estas falsa. Ĉar pri religiaj asertoj, eĉ la plej nekredindaj, oni ne demandas. Tion faras nur ateistoj. Tial oni konsideras nin agresemaj – ĉar ni laŭte starigas demandojn pri aferoj, pri kiuj aliaj homoj preferas silenti.



# Ateistoj scipovu argumenti por ateismo

*Aharon Davidzon (Israelo)*

Mi estas unu el tiuj ateistoj, kiuj povas diri, ke mi naskiĝis ateisto, kaj ke mi neniam havis religiajn sentojn. Tio povas esti unu el la pruvoj, ke religio ne estas denaska. Dankon pro tio al mia patro, kiu klarigis al mi la mondon racie, tuj kiam mi ion komprenis.

Kompreneble la granda plimulto da ateistoj atingis ateismon en malsamaj aĝoj pro multenombraj kialoj. Laŭ mia opinio, multaj ateistoj ne havas klaran ideon pri la kaŭzoj, kiuj kondukis ilin al ateismo – foje temas pri homoj seniluziigitaj ĉar Dio ne plenumis iliajn preĝojn. La divido de ateismo en fortan kaj malfortan ateismon estas konata. Ekzistas ateistoj, kiuj partoprenas en religiaj festoj kaj ceremonioj.

Laŭ mi ekzistas multe da konfuzo pri ateismo. Kompreneble la neado de kreado kaj de la kreinto estas la fundamenta ideo. Sed ateistoj devas klopodi kompreni kaj klarigi tiun ideon. Ateistoj devas regi la filozofiajn kaj sciencajn argumentojn por povi klarigi fenomenojn laŭ ateisma vidpunkto. Ili devas povi klarigi, ke homaro kaj ja la universo ne estis kreita, ke ja nenio povas esti kreita el nenio (kontraste al la ideo de "creatio ex nihilo"), kion la greka filozofo Parmenido komprenis antaŭ 2500 jaroj. Kompreneble ĉi tiu deklaro instigas akrajn diskutojn, kio estas tute bonvena afero en filozofia debatado.

## Forpasis ATEO-membro el Israelo

Kun bedaŭro ni informas pri la forpaso ĉi-somere de relative nova membro de ATEO, Aharon Davidzon el Israelo. Li lernis Esperanton post sia emeritiĝo, kaj tuj membriĝis ekde 2004 en Esperanto-Ligo en Israelo kaj UEA. Li membriĝis en ATEO ekde 2021, kaj fakte kontribuis al la temo "Ĉu la mondo estus pli bona kaj pli paca sen religio?" en *Ateismo* n-ro 33. Ni aperigas sekvan kontribuon de li ĉi-supre.

Aharon naskiĝis en Rumanio kaj migris al Israelo en 1976. Ĝis sia emeritiĝo Aharon laboris en la ĉefa israela sankliniko Klalit en Jerusalemo kiel familia kuracisto. Lia kunulino Ŝulamit informis, ke li mortis pro komplikaĵoj de pulminflamo ne longe post falo en sia apartamento. Ŝi skribis al ni, ke li estis tre feliĉa havi kontakton kun ATEO. Niajn kondolencojn al ŝi kaj aliaj familianoj.

# Tutnacia ribelo en Irano kontraŭ teokratia diktaturo

*Nyegosh Dube (Pollando)*



*Mahsa Amini, kies morto okazigis la ribelon en Irano (Kurdpa)*

**Kio instigis la iranajn protestojn?**

Ŝi estis festonta sian 23-jariĝon post ok tagoj. "Dolĉa knabino, kiu nur pensis pri vivo, muziko, vojaĝado kaj arto… ĉiam ridetanta, plena je entuziasmo kaj energio", laŭ kuzo ŝia. La 14an de septembro, la irana religia polico arestis junan irankurdan virinon, Mahsa Amini, en Teherano pro neĝusta portado de hiĝabo (islama kaptuko) kaj de strikta ĵinso. Laŭ sia familio, Amini estis sovaĝe batita kaj ŝia kapo frapita plurajn fojojn. La 16an ŝi mortis en hospitalo, post du tagoj en komato. La registaro kaj polico neis la akuzojn. La Irana krimmedicina instanco asertis, ke ŝi mortis pro jam ekzistanta malsano kaj ne pro policaj batoj – tamen ŝia familio forte neas tion. Tiu terura okazaĵo erupciigis grandajn protestojn tra tuta Irano, kiuj daŭras ĝis hodiaŭ. Cent miloj sur la stratoj de Irano postulas la finon de la teokratia reĝimo kaj ĝia teroro. Nesurprize, la reĝimo, alfrontante la plej grandan ribelon ekde ĝia enpotenciĝo en 1979, respondas brutale, mortiginte almenaŭ 448 homojn, inkluzive de 63 infanoj, ĝis la 25a de novembro.

## Kiu protestas?

La protesto-farantoj malakceptas la oficialan mort-klarigon kaj la protestoj jam eniris sian trian monaton, montrante neniun signon de malfortiĝo. Irananoj de ĉiuj aĝoj, etnoj kaj genroj, kaj de ĉiuj sociaj tavoloj, aliĝis al la manifestacioj, sed ĉefe la pli junaj generacioj surstratiĝas, inkluzive de studentoj kaj lernejanoj. "Virinoj komencis ĉi tiun ondon de protestoj," diras Ramyar Hassani, proparolanto de la irankurda Organizaĵo por Homaj Rajtoj "Hengaw". "Sed baldaŭ viroj aliĝis, kaj nun virinoj kaj viroj staras ŝultro-al-ŝultre. La tuta Irano estas unuiĝinta. La unuan fojon en la historio de Irano de post la Islama Revolucio, ekzistas tia unika unueco inter la iranaj etnoj. Ĉiuj ĉantas la saman sloganon. Iliaj postuloj estas la samaj." Tiu slogano estas "Ĵin, Ĵijan, Azadi" (Virino, Vivo, Libereco), uzata jam de kelkaj jaroj en la kurda libereca lukto. La slogano disvastiĝis tra Irano kaj oni ankaŭ aŭdas la persan version: "Zan, Zindegi, Azadi".

## Kie okazas la protestoj kaj en kiaj formoj?

La protestoj komenciĝis en Teherano la 16an de septembro tuj post la disvastiĝo tra la reto de la novaĵoj pri Amini, unue rekte antaŭ la hospitalo, kie ŝi mortis, kaj poste aliloke en la urbo. La sekvan tagon eksplodis protestoj en ŝia hejmurbo Sakezo en la provinco Kurdistano dum ŝia funebra ceremonio, kaj sekve erupciis protestoj en Sanandaĝo, la ĉefurbo, kaj aliaj urboj en la provinco. (La kurda regiono fakte ampleksas kvar okcidentajn provincojn.) Kreskis la protestoj en Teherano kaj ene de kelkaj tagoj, la protesto-movado atingis aliajn urbojn (interalie Bandar-Abaso, Tabrizo, Maŝado, Kumo, Kermanŝaho, Hamadano, Isfahano, Ŝirazo, Zahedano) kaj ankaŭ urbetojn en ĉiuj partoj de Irano. La 26an de oktobro okazis protestoj en 33 urboj en 23 iranaj provincoj okaze de la fino de la tradicia 40-taga funebra periodo por Amini.

Preskaŭ ĉiu speco de paca, neperforta protesto estas uzata en Irano, laŭ Hassani. Oni manifestacias grandnombre, precipe en la stratoj de urboj. Multaj virinoj forprenas kaj svingas siajn hiĝabojn, foje eĉ bruligas ilin, dum aliaj tondas siajn harojn. La protestuloj ĉantas la nun faman sloganon "Virino, Vivo, Libereco!", sed ankaŭ "Morto al la diktatoro!", deziro direktita al la Supera Gvidanto Ali Ĥamenei, posteulo de la Ayatolo Ĥomejni, kaj ili detruas grandajn afiŝojn de ambaŭ teokratiajn tiranojn. Tamen la protestoj foje fariĝas perfortaj, okazas akraj bataloj kontraŭ la sekurec-fortoj. Mez-novembre, la familia domo de la Ajatolo Ĥomejni en la urbeto Ĥomejno, kie li naskiĝis, estis bruligita fare de protestamasoj, kio ja indikas la seriozecon de la ribelo.

Krom la urbaj stratoj, alia granda



*Gejunuloj protestas en Irano, bruligas hiĝabojn (Getty Images)*

okazejo de protestoj estas universitatoj, kie studentoj amase manifestacias, sidstrikas, bojkotas klasojn, kaj batalas kontraŭ la sekurecanoj. La universitatoj troviĝas en ĉiuj el la jam menciitaj urboj, sed ankaŭ en multaj aliaj urboj. Entute en 143 universitatoj erupciis protestoj. Sed studentoj ankaŭ protestas alimaniere: ili rompas la murojn, kiuj apartigas la genrojn en universitataj manĝejoj kaj manĝas kune – revolucia ago! Kaj ankaŭ lernejoj fariĝis protestejoj, kie lernantoj manifestacias, kaj eĉ tie sekurecanoj atakas. Fine, gravas mencii la dekmilojn da laboristoj en la granda nafta-petrola kaj en la industria sektoroj (ekzemple en pluraj ŝtalfabrikoj), kaj la milojn da kamionistoj, kiuj strikas, kaj la bazarojn kaj vendejojn en diversaj urboj, kiuj fermiĝas solidarece.

**Kiel respondas la reĝimo?**

La reĝimo respondas kiel diktaturaj reĝimoj kutime respondas: perforte. La sekurec-fortoj (ĉefe de la Revolucia Gvardio) uzas diversajn nemortigajn metodojn, sed ankaŭ en multaj kazoj mortigajn pafilojn, per kiuj ili vundas kaj mortigas protesto-farantojn grandnombre. En kelkcent kazoj, nemortigaj municioj blindigis homojn. Laŭ Hassani, la sekurecanoj atakis “tre perforte” ekde la komenco, speciale en regionoj, kie vivas etnaj malplimultoj, kiel Kurdio kaj Baluĉio. Fakte en Zahedano, la baluĉia ĉefurbo, okazis masakro fin-septembre de 96 protestuloj post la vendredaj preĝoj. En oktobro okazis grandaj strat-bataloj en la kurda urbo Sanandaĝo. Kaj mez-novembre, la sekurec-fortoj lanĉis milit-stilan operacion en pluraj kurdaj urboj kun kirasitaj veturiloj

kaj helikopteroj. Sekve erupciis solidaraj protestoj en Teherano kaj aliaj urboj tra Irano. Laŭ la reĝimo, kulpas pri la protestoj unuflanke kurdaj kaj baluĉaj separistoj kaj aliflanke Usono (la "Granda Satano") kaj Israelo – kompreneble ĝia propra konduto neniel kulpas!

Ligite kun la perforta, brutala traktado de protestuloj sur stratoj, ĉe universitatoj kaj aliloke, la sekurecanoj faras arestojn grandskale. La arestitoj spertas severan mistraktadon: batadon, torturadon kaj seksan misuzadon kaj perfortadon. Ekde la komenciĝo de la protestoj, "miloj da personoj – laŭ kelkaj taksoj pli ol 14 000 – estis arestitaj, inkluzive de defendantoj de homaj rajtoj, studentoj, advokatoj, ĵurnalistoj kaj civil-sociaj aktivuloj," laŭ Javaid Rehman, speciala raportisto por Unuiĝintaj Nacioj pri homaj rajtoj en Irano. Rehman ankaŭ atentigis pri la decido okazigi procesojn kontraŭ ĉirkaŭ 1000 arestitoj, notante ke kelkaj el la akuzoj povus rezultigi mortopunon. Ĝis nun fakte 21 protestuloj estas akuzitaj pro mortpuneblaj krimoj kiel "militado kontraŭ Dio" el kiuj kvin estis mortkondamnitaj. Irano jam estas la plej mortpunema lando post Ĉinio.

## Kio estas la kunteksto?

Estas profunda kolero en Irano pro la islamaj devigoj truditaj de la registaro, precipe tiuj rilate al virina vestado. Kiam la hiĝabo fariĝis deviga en 1983, okazis protestoj, kiuj daŭras ekde tiam. Frustriĝoj pliiĝis de kiam la senkompromisa Ebrahim Raisi iĝis prezidanto en 2021 kaj komencis pli rigore apliki la vestoregularon, diras Roulla, irana politika aktivulo kaj esploristo, kiu volis kaŝi sian identecon. Li krome atentigas, ke tutmondiĝo kaj la interreto detruis kulturajn diferencojn inter gejunuloj en Mezoriento kaj Eŭropo, kio sekve instigas junajn irananojn protesti. "Kiam junulino en Irano vidas en sociaj retoj, ke dum ŝi kaj ŝiaj amikinoj enuas en devigaj lecionoj de religio, junuloj aliloke festas."

Tamen la protestoj atestas ankaŭ la malsukceson de reformoj. "Dum jardekoj, irananoj havis multajn esperojn pro la promesoj de reformemaj gvidantoj, ke okazos ŝanĝiĝoj," diras Shadi Sadr, irana advokatino pri homaj rajtoj. "Sed nenio okazis. La mesaĝo nun estas tute klara: la Islama Respubliko mem devas foriri." Eksprezidantoj Hassan Rouhani kaj Mohammad Ĥatami provis siatempe alproksimigi Iranon al la Okcidento, malpliigi sociajn limigojn, kaj pliigi civitanajn liberecojn, sed tiuj klopodoj malsukcesis. Kaj ne nur tio: la ekonomio de Irano kolapsis en la lastaj jaroj, dum malegaleco kreskis. "Junuloj observas, ke potenculoj kaj iliaj gefiloj ĝuas luksan vivon dum normalaj irananoj ne vidas estontecon," diras Hassani. Post kiam Usono retiriĝis de la Irana nuklea interkonsento – por malhelpi Teheranon disvolvi nuklean armilon – en 2018, internaciaj sankcioj estis starigitaj kontraŭ Irano kaj ĝia valuto falis abrupte. Estis ordinaraj irananoj, kiuj pleparte suferis la ekonomiajn postsekvojn.

### Kiel ĉi tiuj protestoj diferencas de antaŭaj?

Kio estas unika pri la hodiaŭaj protestoj estas ke ili unuigis preskaŭ ĉiujn sekciojn de la socio. Laŭ Roulla, en 2019 la pli malriĉaj partoj de la socio protestis kontraŭ altiĝo de brulaĵ-prezoj, dum la protestoj en 2009 estis ligitaj kun la pli mezklasa temo de voĉdonado. La "simpla kialo" kial ekzistas pli da unueco nun, li asertas, estas ke Amini estis "ordinara knabino". "Ŝi estis prenita de sia familio ... estas multe pli facile simpatii kun tio." Io alia, kio distingas ĉi tiujn protestojn disde tiuj en la pasinteco, estas ke ili montras, ke la Islama Respubliko "perdis legitimecon inter siaj kernaj subtenantoj", diras Sadr. Nun, por la unua fojo, kontraŭregistaraj manifestacioj okazas en pli konservativaj urboj kiel Kumo kaj Maŝado. "Tio ĉi ne estas protesto-movado por reformo" laŭ Roham Alvandi, vic-profesoro de historio ĉe London School of Economics. "Ĝi estas ribelo, kiu postulas la finon de la Islama Respubliko. Kaj tio estas io tute malsama kompare kun antaŭe."

### Ĉu la protestoj povus faligi la reĝimon?

Observantoj havas diversajn opiniojn pri tio. Malgraŭ la perforta subpremo, la protestoj daŭras jam fariĝinte la plej granda defio, kiun la reĝimo alfrontas de post la revolucio de 1979. Unu grava faktoro, diras Roulla, estos tio: ĉu la reĝimo restos unueca, kaj ĉu partoj de la sekurec-fortoj ne aliĝos al la ribelantoj. La lasta reĝo de Irano falis en 1979 post kiam amaso da armeanoj transaliĝis. Dum tiuj ĉi protestoj, videoj ja aperis en sociaj komunikiloj montrantaj transaliĝojn de sekurecanoj, sed ili ŝajnas esti izolitaj okazaĵoj. Tamen, Roulla asertas, ke la reĝimo estas pli malunueca ol ŝajnas. "Eĉ se la reĝimo povos bremsi la ribelon dum iom da tempo," diras Hassani, "la afero ne finiĝos. Ni jam transiris la sojlon de revolucio."

*Artikolo preparita ĉefe surbaze de artikolo de Joshua Askew aperinta en la retejo de EuroNews, kun multaj aldonaj informoj el diversaj fontoj, interalie Vikipedio (anglalingva), The Guardian, BBC, IranWire, Deutsche Welle, CNN kaj Iran International.*

**Ne forgesu reaboni al *Ateismo*!**

Venis la momento por pagi vian kotizon al ATEO! Per tiu kotizo vi ricevos du numerojn de nia revuo jare, kaj ankaŭ subtenos la agadon de nia asocio.
La kotizo restas sama: 10 eŭroj por A-landoj kaj 8 eŭroj por B-landoj. Ĉiuj membroj ricevos la retan version de la revuo, sed se vi deziras ricevi ankaŭ la paperan version, bonvolu aldoni al via kotizo 2 eŭrojn: t.e. 12 eŭroj por A-landoj kaj 10 eŭroj por B-landoj.
Pliaj detaloj troviĝas en la malantaŭa kovrilo, aŭ bonvolu skribi al la sekretario por pliaj informoj.
Subtenu la agadon de ATEO per via kotizo!

# Senreligiuloj en Britujo plimultiĝas laŭ la popolnombrado 2021

*Anna Lowenstein (Britio)*

En la numero 32 de nia revuo aperis artikolo kun la titolo *Ateistoj: ekstaru por esti nombrataj!* (numero de majo 2021, p. 3-4). Temis pri la popolnombrado okazinta en Britujo du monatajn pli frue. La brita humanisma asocio, Humanists UK, faris reklamkampanjon por kuraĝigi la homojn elekti la fakon "Neniu religio".

Nun oni anoncas la unuajn rezultojn de tiu popolnombrado, kaj ŝajne la instigo de Humanists UK havis sekvojn. Laŭ artikolo aperinta en la retejo de BBC la 29an de novembro, malpli ol duono de la homoj en Anglujo kaj Kimrujo indentigas sin kiel kristanojn. (Ankoraŭ ne estas anoncitaj la rezultoj de la skota popolnombrado, kiu estis prokrastita ĝis 2022 pro la pandemio.)

La proporcio de homoj, kiuj identigis sin kiel "sen religio" altiĝis al 37,2% de la loĝantaro. Laŭ la antaŭa popolnombrado en 2011, tiu proporcio estis proksimume 25%. Kontraste, la homoj, kiuj nomas sin kristanoj, falis al 46,2%, dum antaŭ dek jaroj estis 59,3%. Tio signifas, ke la nombro de kristanoj en Anglujo kaj Kimrujo nun oficiale falis sub duonon de la loĝantaro. Aliflanke, tiuj kiuj identigas sin kiel islamanojn kreskis de 4,9% en 2011 al 6,5% en 2021.


Atentu, ke la esprimo "Neniu religio" estas tre ĝenerala. Ne ĉiuj, kiuj indikis tion por la popolnombrado, nepre estas ateistoj

Laŭ Andrew Copson, la ĉefa estrarano de Humanists UK, tiuj ciferoj estas atentigo, kiu devus konduki al rekonsiderado de la rolo de religio en la brita socio. Li diris: "Neniu ŝtato en Eŭropo permesas tiel fortan influon de religio rilate al juro kaj publikaj politikoj, dum samtempe estas tiel senreligia loĝantaro."

*Fonto: www.bbc.co.uk/news/uk-63792408*

**Preskaŭ 4 el 10 estas senreligiaj**

Religio en Anglio kaj Kimrio, 2001-2021




"Aliaj" inkluzivas hinduojn, sikojn, budhanojn, judojn kaj aliajn religianojn

Fonto: Office for National Statistics (Britio) BBC

# Hinduaj naciistoj demagogie atakas la Mogulojn

*Nyegosh Dube (Pollando)*



La Taĝ-Mahalo estas mond-fama monumento en Barato, renoma pro siaj unikaj beleco kaj majesteco. Efektive ĝi estas la simbolo de Barato same kiel la Ejfel-Turo simbolas Francion kaj la piramidoj Egiption. Ĝiaj konstruintoj estis la Moguloj*, islama dinastio, kiu regis la landon dum ĉirkaŭ 200 jaroj. Kvankam ili komencis kiel fremda potenco el Centra Azio, ili sekve enradikiĝis en Barato kaj plejparte praktikis politikon de toleremo, kunekzistado kaj kunlaboro rilate al hinduoj kaj aliaj ne-islamanoj, kreante kulturan sintezon. Ili estas konataj pro siaj atingoj en la kampoj de ŝtat-administrado, ekonomia evoluigo, arto, beletro kaj, plej videble, arkitekturo.

Tamen hinduaj naciistoj, inkluzive de la nuna ĉefministro de Barato kaj lia partio (Barata Popola Partio, grava parto de la hindu-naciisma "Hindutva"-movado), kalumnias la Mogulojn. Tio estas parto de ilia kampanjo celanta la renversigon de la sekularismo proklamita en la Konstitucio kaj la transformadon de Barato en hinduan ŝtaton, kie religiaj minoritatoj, speciale la islamanoj, estos subigitaj. La Moguloj ja havas specialan lokon en la bigotaj mensoj de la hindutvanoj. Ĉefministro Narendra Modi ofte parolas pri "1200 jaroj da servuteco", kiuj ampleksas la

britan regadon, la Mogulan imperion, la Delhian sultanlandon (tricentjara sinsekvo de kvin islamaj dinastioj). Tiuj regnoj kune daŭris 700 jarojn, do Modi aldonis kvin jarcentojn! Ne nur tio: neniuj regnoj antaŭ la sendependiĝo de Barato en 1947 estis elektitaj de la hinda popolo, ĉu islaman-estrataj, ĉu hindu-estrataj, ĉu aliaj. Ĉiuokaze, la Moguloj fariĝis plene hindaj kaj kontribuis grandskale al hindaj kulturo kaj socio. Krome, la hindutvanoj akuzadas tiujn regnojn pri amasa rabado de la lando, kio, escepte de la brita regado, estas plejparte falsaĵo. La Moguloj plifortigis la ekonomion ĝis la malneta produkto de Barato konsistigis 25% de la monda ekonomio.

Dum longa tempo, unu el la plej admirataj regantoj de Barato estis la mogula imperiestro Akbar, granda patrono de arto, kulturo kaj beletro, kiu estis religie tolerema kaj scivolema kaj celis al interreligia harmonio, kaj efektive kreis sekularan ŝtaton. Lia plej amata edzino estis hindua princino (kiu restis hindua) – ilia filo mem fariĝis imperiestro kaj ties filo konstruigis la Taĝ-Mahalon. Kaj lia plej ŝatata konsilanto estis la hinduo Birbal. Siatempe, Akbar estis same populara inter hinduoj kiel inter islamanoj. La imperiestro organizis ĉiusemajnajn diskutojn kaj debatojn inter reprezentantoj de diversaj religioj – kaj ankaŭ de la ateisma Ĉarvako-skolo (vidu artikolon pri ĝi en *Ateismo*, Majo 2017). Li kreis Din-i-Ilahi, kiun oni povus nomi "Esperanto de religioj", kiel pontan religion, kiu kunigis elementojn de hinduismo, islamo, kristanismo, budhismo kaj zoroastrismo. Multe interesis Akbar la antikvaj hinduaj epopeoj la Ramajano kaj la Mahabarato, verkitaj en sanskrito – li iniciatis grandan projekton por traduki ilin en la persan lingvon, la oficiala lingvo de la Mogula korto, kaj grava lingvo en la Mezoriento kaj Centra Azio.

Kia estis la stato de hinduoj en la Mogula Imperio? Kiel mi jam menciis, ĝis la 20a jarcento baratanoj ne elektis siajn regantojn. Regantoj konkeris potencon, heredigis ĝin al siaj filoj, konkeris teritoriojn (kion sukcese faradis ankaŭ Akbar) ofte batalante kontraŭ samreligianoj, kaj regis siajn regatojn, ĉu hinduojn, islamanojn aŭ aliajn. Ekzistis diversaj hinduaj kaj islamaj dinastioj. La viv-kondiĉoj de ordinaraj homoj ne tro dependis de la religio de ties regantoj. Dum la tuta Mogula periodo, hinduoj estis liberaj praktiki sian religion, havis propraјn leĝojn rilate al familiaj kaj komunumaj aferoj, ne suferis ĝeneralan persekutadon. Ne nur tio: hinduoj dominis la komercan vivon de la lando kaj ankaŭ la ŝtatan financan administradon, kiun dum la regno de Akbar estris hindua ministro. Hinduoj okupis multe pli grandan proporcion de alt-nivelaj ŝtataj postenoj sub la Moguloj ol dum la brita regado. Ankaŭ rimarkindas, ke la Moguloj varbis hinduajn Raĝputojn (militista socia grupo iom simila al la Kozakoj) al sia nobelaro, dungis multajn hinduojn kiel oficirojn en la imperia armeo, kaj alianciĝis kun diversaj Raĝputaj

regantoj. Fakte okazis multe da strategiaj geedziĝoj inter Moguloj kaj Raĝputoj por plifortigi ilian aliancon.

Aliflanke, eblas kritiki la Mogulojn pri diversaj kontraŭhinduaj agoj kaj politikoj – ĉefe inter ili la masakro de miloj da hinduaj civiluloj post longa sieĝo de la Raĝputa fortikaĵo Ĉittor fare de Akbar (tiam nur 25-jara), la detruado de hinduaj temploj fare de Aŭrangzeb, la lasta el la ses famaj Mogulaj imperiestroj, kaj ankaŭ lia restarigo de la "ĝizja"-imposto pagenda de hinduoj, kiu provokis strat-protestojn sed ankaŭ kritikadon fare de islamanoj en lia korto. La imposton starigis la Delhia sultanlando kaj estis Akbar, kiu fakte abolis ĝin. Akbar fariĝis la plej tolerema, plej liberpensa, plej sekularema el ĉiuj Mogulaj imperiestroj. Li multe interesiĝis pri hinduismo kaj estis influata de ĝi diversmaniere. Kontraste, Aŭrangzeb enkondukis duon-teokratian reĝimon: kiel fidela tradicia islamano li provis gvidi la ŝtaton laŭ ortodoksaj islamaj principoj, kio havis diversajn negativajn sekvojn por hinduoj, kvankam ankaŭ islamanoj suferis pro la rigora aplikado de islamaj reguloj.

La problemo estas, ke la hodiaŭaj hinduaj naciistoj ne nur kondamnas Aŭrangzeb pro lia restarigo de la "ĝizja"-imposto (kion li fakte ne faris ĝis la 20a jaro de sia regado) kaj lia detruado de temploj (kies skalon ili troigas kaj kies kialojn ili ignoras), sed ankaŭ akuzas lin tute false pri genocido kaj perforta konvertado de hinduoj. Sekve Aŭrangzeb estas la celo de aparte akra kalumniado – la ĉefministro Modi mem atakas lin dum publikaj paroloj. Krom tiuj falsaj akuzoj, ili malatentas la faktojn, ke Aŭrangzeb ankaŭ ordonis la protektadon de multaj temploj, havis pli altan proporcion da hinduoj en imperiaj postenoj ol iu ajn alia Mogulo, kaj malpermesis sation, la membruligadon de hinduaj vidvinoj. Tamen, la hindutvanoj kondamnas ne nur Aŭrangzeb, sed la Mogulan regnon ĝenerale, inkluzive de Akbar kaj Ŝah-Ĝahan, la konstruinto de



la Taĝ-Mahalo – por ili la Moguloj estis tute aĉaj sangosoifaj fremdaj invadintoj, kiuj faris nenion bonan por Barato. Tial ili nun kondukas kampanjon por ŝanĝi la nomojn de stratoj, stacidomoj, urboj ktp ligitaj kun la Moguloj kaj detrui moskeojn, kiuj estis konstruitaj kie iam staris temploj – kaj pli ekstremaj hindutvanoj eĉ deziras, ke la Taĝ-Mahalo estu detruita!

Certe por hinduaj naciistoj estas ege ĝene, ke membroj de minoritata grupo regis super la multe pli granda hindua majoritato. Tial ili kondamnas ilin, forgesante tamen, ke hinduoj neniam konsistigis sendistingan blokon, ke kastaj kaj regionaj identecoj estis pli gravaj ol la ĝenerala hindua identeco, ke la multenombraj Dalitoj (iamaj netuŝebluloj) suferis severan diskriminacion fare de aliaj hinduoj, ke Barato estas multreligia lando de jarmiloj kaj nehinduaj regnoj plejparte estis same barataj kiel hinduaj. Krome, ĉiuj regantoj kaptis aŭ heredis potencon ne reprezentante iun ajn popolan grupon.

La hinduaj naciistoj utiligas demagogion en siaj atakoj kontraŭ la Moguloj kun la politika celo identigi la nuntempajn baratajn islamanojn kun tiu laŭ ili fremda invada dinastio. Por la hindutvanoj, estas necese ke la Moguloj estu vidataj kiel entrudiĝintoj kaj eksteruloj, kiuj interrompis oran epokon de hindua civilizo kaj sekve ke la tuta islamana komunumo estu markita kiel perfidaj eksteruloj. Historio ne subtenas tiun vidpunkton, sed hindutvanoj vivas en paralela universo de historiaj falsaĵoj. Kiel ni ĵus vidis, ili prezentas neekvilibran falsigitan bildon de Aŭrangzeb por pentri lin kiel eble plej negative. Kaj tamen, eĉ se ni agnosku, ke Aŭrangzeb estis la plej fervore islama, netolerema, kontraŭhindua imperiestro, oni ne rajtas ĝeneraligi tion al la Mogula regno ĝenerale. Hinduaj naciistoj rifuzas vidi la Mogulan imperion en ekvilibra, objektiva maniero, disvastigas falsaĵojn pri grandskala Mogula persekutado de hinduoj. Laŭ ili, islamanoj subpremis hinduojn dum jarcentoj, tial ili meritas esti atakataj kaj subpremataj hodiaŭ, kiel venĝo. Sed, senkonsidere de iuj ajn kontraŭhinduaj misagoj de la Moguloj, oni ne rajtas uzi tion por instigi kontraŭislaman malamon, diskriminaciadon kaj perfortadon en la nuntempo.

** Mi uzas la vorton "Moguloj" anstataŭ la PIV-an "Mogoloj" ĉar ĉi-lasta estas tro simila al "Mongoloj". En la angla, oni diras "Moghuls" aŭ "Mughals".*

*Artikolo verkita surbaze de artikoloj en la retejoj thewire.in, dailyo.in, bbc.com, scroll.in, countercurrents.org, theprint.in, columbia.edu, britannica.com, aeon.co, dailysabah.com, huffpost.com, sup.org, la angla Vikipedio, kaj de informoj en la libroj "India: A History" de John Keay, "The Mughal Throne" de Abraham Eraly kaj "The Discovery of India" de Jawaharlal Nehru. (Ŝajnas ke la hindutvanoj aktivas en Vikipedio: en la hindi-lingva vikipedia artikolo pri Barato, la Moguloj tute ne estas menciitaj!)*

# ATEISMO

## ENHAVO


**Vorto de la Redaktoro**

**En Fokuso**

Atenco kontraŭ mondfama ateista aŭtoro 3

Kial Rushdie ne ricevis la Nobel-premion? 6

**Ateisma Vivo**

Ĝis kiu grado estas akcepteble ofendi religiajn sentojn? (7 kontribuoj) 7

ATEO dum la VK 2022 12

Ĉu vi timas la vorton "ateisto"? 14

Vigla kunveno de ATEO en Montrealo 15

Ankaŭ ateistoj rajtas ĝui Kristnaskon 16

**Pripensigoj**

Fiziko, vivo kaj kredo 18

Provoka demando de ateisto 19

Ateistoj scipovu argumenti por ateismo 21

**Ĉirkaŭ la Mondo**

Tutnacia ribelo en Irano kontraŭ teokratia diktaturo 22

Senreligiuloj en Britujo plimultiĝas 27

Hinduaj naciistoj demagogie atakas la Mogulojn 28



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org
Prezidanto: Giridhar Rao, Barato
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Grafikisto: Lautaro Croce, Argentino
Jarkotizo: 10 eŭroj (A-landoj) / 8 eŭroj (B-landoj)
Por ricevi la paperan revuon, bonvolu aldoni 2 eŭrojn
Konto: **ateo-y** ĉe UEA